

Ĉeĥoslovakio kaj la nuntempa Eŭropo.

Dr. František Weyr, profesoro de la Masaryk-universitato
en Brno.

Malnova estas la aserto, ke la bohema reĝolando estas ne nur la geografia centro de Eŭropo, sed ankaŭ la ŝlosilo al ĝia *politika potenco*. En la pasintaj jarcentoj ĉi tiu aserto estis dirata kaj kredata en la tuta Eŭropo. Sed tiam oni pensis nur je tia politika konstelacio, en kiu tiu ĉi malnova reĝolando kune kun ĝia loĝantaro estis *nura objekto* en la manoj de fremdaj dinastioj; nura objekto, kvankam tre ŝatata kaj dezirinda.

Tiu ĉi reĝolando ŝanĝis siajn rolojn en la jaro mil-naŭcent-dek-ok post la definitiva malvenko de la Centraj ŝtatpotencoj en la mondmilito. El la estinta pasiva objekto fariĝis dum nokto tre aktiva centro de nova ŝtata organizaĵo: de la ĉeĥoslovaka respubliko - centro ne geografia sed politika. Dum tutaj jarcentoj estis la popolo kondamnita ludi la rolon de pasiva inventaraĵo en la ŝtata mastrumo de nacie fremda kaj malamika habsburga dinastio kaj ĝia internacia politiko. Tiu ĉi popolo staris subite antaŭ tasko, kiu estis tute mala al ĝia ĝisnuna rolo. Per propra forto kaj klarvida politika prudento ĝi devis fariĝi faktoro, kiu estus kapabla ankaŭ estonte teni la teritorion de li loĝatan kaj fariĝi centro de politika organizo de Eŭropo. Jen tasko egale malfacila kaj peniga kiel grava kaj honora. Grava, ĉar la mondmilito ĝisfunde ŝanĝis ĝuste la karton de la centra Eŭropo. Disfalis la aŭstro-hungara regno, granda kaj potenca politika organizaĵo, rigardanta je centjara kulturo kaj tradicio. Ĝian lokon okupis vico de novaj, relative malgrandaj memstaraj ŝtatoj, kiuj grandparte ne povis apogi sin al ia ajn tradicio aŭ sperto. Ĝuste tiu ĉi fakto estis la kaŭzo, kial multaj dubantoj en la tuta Eŭropo ektimis la konsekvencojn de tiel nomata balkaniĝo de Eŭropo. Estos tasko de la novaj ŝtatoj kaj unuavice de la ĉeĥoslovaka respubliko, ke ili montru per siaj prudento kaj politika saĝo, ke tiu ĉi timo estis senkaŭza.

Por sia ŝtata organizo elektis Ĉeĥoslovakio formon de tre radikala, parlamenta demokratio laŭ la franca modelo. Tio certe estis riska eksperimento, sed ŝajnas, ke la gvidantaj viroj de la jaro mil-naŭcent-dek-ok ne havis alian elektelecon. Por Ĉeĥoslovakio kaj precipe por la ĉeĥoslovaka popolo *ne konvenas* alia reĝimo pro *diversaj* kaŭzoj. La ĉeĥa kaj slovaka popoloj estas laŭ siaj karakteroj kaj pensado demokratiaj; mankis ankaŭ por alia reĝimo, nome por monarĥio, la plej grava kondiĉo, t.e. konvena dinastio. *Krom tio* la bona sorto favoris la ĉeĥoslovakon popolon en tiu ĉi *historie decida momento*: elkreskis el la gvidinto de la eksterlanda revolucio dum la mondmilito *ne nur fondanto* de ĝia nova sendependa *patrujo*, sed ankaŭ *granda ŝtatisto*, en kiu en unika maniero unuiĝas ĉiuj ecoj necesaj al *estro de moderna respublika* organizaĵo. La veron de tiu ĉi fakto rekonas la eksterlando eble pli ĝenerale ol la patrujo mem. Tiel rebonigis la sorto multajn malfavorajn kondiĉojn, kiujn ĝi donis en la lulilon de la nova ŝtato. Tio estas, la relative tre malfavora geografia situo de la ŝtata teritorio, kaj la fakto, ke ĝi estas kvazaŭ kojno inter ŝtatoj, kiuj plejparte nek politike nek rase estas parencaj aŭ amikaj al ĝia loĝantaro. Sed ankaŭ la reĝimo, kiu estas nuntempe tiel ŝatata kaj laŭdata de multaj homoj, la moderna diktatoreco, tio estas la gvidanteco kune kun ĝiaj ceremonioj, formalajoj, ĝeneralaj devizoj kaj ofta senindulgeco kontraŭ ĉia individualismo, ne konvenas por la popoloj loĝantaj en la ĉeĥoslovaka respubliko. En sia sobereco ili ne havus por similaj aferoj la necesan komprenemon kaj estas tre neverŝajne, ke ili daŭre tolerus iun ajn diktatoron pli-malpli memfaritan.

Ĝuste en la nuna tempo montriĝas la danĝera situo de la ĉeĥoslovaka respubliko en tre akra lumo, spite tion, ke ĝi mem apartenas politike kaj ekonomie al la plej konsoliditaj ŝtatoj de la centra Eŭropo. Mi ne pensas je la ĝenerala krizo pezanta sur la tuta mondo, sed je la ĝisfunde irantaj politikaj renversoj, kiuj okazadas en niaj najbaraj ŝtatoj. La reĝimon, kiun elektis Ĉeĥoslovakujo - ne kompromisan demokration - ni vidas tie ŝanceliĝi aŭ ĥaose fuĝi de siaj pozicioj. Ni volas neniel aserti, ke la demokratia reĝimo estas absolute bona, ke ĝi taŭgas por ĉiuj popoloj kaj ĉiuj cirkonstancoj. Sed estas fakto, ke Ĉeĥoslovakio estas nuntempe la sola bastiono, kie ĝi ankoraŭ firme staras. Ĉeĥoslovakio klopodas konservi la ideojn interrilatojn kun la grandaj sur centjara tradicio forte bazitaj okcidentaj demokratioj: kun Francio kaj Britujo.

Se en la centra Eŭropo en la estonteco fin-fine tamen venkos la *demokratia ideo*, eĉ se nur

pro tio, ke ne troviĝus alia konvena reĝimo por ĝiaj kleraj kaj progresintaj popoloj en la mezo de la dudeka jarcento, tiam denove ĝi estus Ĉeĥoslovakio, la historia lando, kie jam tiel ofte decidiĝis la politika sorto de l' Eŭropo, ĉirkaŭ kiu kristaliĝus nova politika organizaĵo de l' popoloj el la centra Eŭropo, libere reganta sin mem laŭ la modernaj devizoj de internacia kunlaboro kaj paneŭropaj ideoj. Ne estos facila trovi ligilon inter la ideo de liberaj popoloj, vivantaj en apartaj ŝtatoj, kies limojn decidis la postmilita politika karto kaj la ideo de larĝa interpopola frateco, fortigita ne nur per komuna kulturo kaj klareco, sed ankaŭ per tiucelaj leĝaj kontraktoj. Estas tre verŝajne, ke ĝuste Ĉeĥoslovakio ricevos la honoran taskon, trovi ĉi tiun ligilon. La komencoj de tia celado jam klare motriĝas sur la politika ĉielo de l' centra Eŭropo. Ni vidas ilin ne nur en la eminenta aktiveco de nia respubliko kun kiu ĝi partoprenas la politikan kaj ekonomian fortigon de la Malgranda Entento, kiu laŭ la refoja deklaro de nia ministro por eksteraj aferoj estas malfermita ankaŭ por la ceteraj ŝtatoj de la centra Eŭropo, ni vidas ilin ankaŭ en nia profunda respekto al la liberalaj kaj ĝenerale humanaj principoj, sekvantaj el la ĝuste komprenita demokratia idealo. Aliloke oni forlasadas ĉi tiujn principojn - kaj ne estas necese iri tro malproksimen por montri ekzemplojn -. Eksterma batalo, jen la devizo de la plimulto kontraŭ la malplimulto. Egale, ĉu temas ĝenerale pri politikaj partioj, aŭ nacioj, aŭ rasoj, aŭ religioj. Nenion similan oni povas ĝis nun observi, dank' al dio ĉe ni, en Ĉeĥoslovakio. En nia registaro reprezentas germanaj ministroj la germanan malplimulton, judoj kaj aliaj rasoj povas trankvile sekvi sian okupon kaj profesion. Kaj tiel restu ankaŭ estonte! Sed kontraŭ tiu, kiu aroge dezirus *misuzi* la liberalajn kaj humanajn tendencojn regantajn nian ŝtaton por fine ilin mem pereigi, kontraŭ tiu uzos la respubliko la rajton, kiun pretendas *ĉiu kreitaĵo sur tiu ĉi mondo: la rajton de memdefendo*.

Mi finis kaj deziras al ĉiuj niaj aŭskultantoj bonan nokton.